## KONGRESAJ PERANTOJ

*Sendu viajn aliĝilon kaj pagon ĉiam al la sama adreso. Aliĝojn oni traktos nur post pago de la kotizo.*

**Aŭstralio** Libroservo de Aŭstralia E-Asocio, 4/23 Albuera St, Battery Point TAS 7004

**Aŭstrio** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg

**Belgio** Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

**Britio** Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Ĉeĥio** Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing

**Danio** Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København

**Estonio** Ahto Siimson, Ept 12-11 Paikuse, 86602 Pärnu Maakond

**Finnlando** Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

**Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

**Germanio** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger Str. 9, 55129 Mainz

**Grekio** Helena Esperanto-Asocio, Aristidu 9, 105 59 Athina

**Hispanio** Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell

**Hungario** Hungaria Esperanto-Asocio, Bródy Sándor u. 38, fszt. 3, 1088 Budapest

**Islando** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík

**Israelo** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô

**Kanado** Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5

**Korea Resp.** Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703

**Kroatio** Boris Di Costanzo, set. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija

**Latvio** Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C

**Nederlando** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam

**Norvegio** Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen

**Nov-Zelando** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, Auckland 0630

**Pollando** Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz

**Rusio** Miĥail Ĉertilov, Titova 6-24, 606211 Liskovo *aŭ* Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad

**Slovakio** Lúbomír Fajth, Plevník 105, 018 26 Plevník

**Svedio** Leif Holmund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå

**Svislando** Poŝtĉekkonto 12-2310-0 je la nomo "Universala Esperanto-Asocio"

**Usono** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608

**Reta aliĝilo**
www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php

**UNUA BULTENO**

# 99ª Universala Kongreso de Esperanto

**Bonaero, Argentino**

**26 julio – 2 aŭgusto 2014**







Bonaero estas la ĉefurbo de Argentino kaj en ĝi loĝas 2,3 milionoj da homoj. Kun la ĉirkaŭaj satelitaj urboj ĝi konsistigas la trian metropolon en Latinameriko, kaj tie vivas unu triono el la 40 milionoj da argentinanoj.



Fondita en 1536, Bonaero estas konata kiel la "sudamerika Parizo" pro siaj novklasikaj arkitekturo, larĝaj avenuoj kaj bulvardoj, abundo da verdaj spacoj, la plej malnova metroo en Latinameriko (kaj en la suda hemisfero), kaj pulsanta kultura vivo. Tie ĉi troviĝas Teatro Colón, la tria plej grava en la mondo, kaj El Ateneo, la plej bela librovendejo en la mondo. Unesko elektis Bonaeron Urbo de Dezajno en 2005 kaj Monda Ĉefurbo de Libro en 2011.

Vizitantoj trovos en Bonaero urbon tre diversan: ekzemple la kvartalon La Boca, kun tipaj lado-domoj multkoloraj, konstruitaj de italaj enmigrintoj antaŭ jarcento, kaj la ĵusan Puerto Madero, kiu leviĝas el grundo gajnita el la maro. Same diversaj estas la ofertoj hotela, distra, kultura kaj gastronomia en tiu ĉi urbo de preskaŭ senfinaj ebloj.

Alia specialaĵo de Bonaero estas la tango. Dum la UK oni planas okazigi kurson pri tiu eleganta dancostilo.

## INTER VINOJ KAJ BOVINOJ

Kvankam la lando estas paradizo por viandemuloj — la plej bongustaj bovaĵoj venas el la Pampoj, la herboriĉa centra ebenaĵo — vegetaranoj renkontos similajn spertojn ĉe vegetaĵoj kaj fruktoj kreskintaj en riĉa grundo sub brila suno. Ĉiuj sezono kaj regiono havas siajn proprajn pladojn, kun forta bazo de la itala, hispana kaj arabaj kuirartoj. Ĉi-lasta aparte montriĝas en la elekteblo de kukoj kaj farunaĵoj:



vi devos nepre gustumi iun el la diversspecaj *alfajores*, ofte ŝmiritaj per delica laktodolĉaĵo, idealaj por akompani vian kafon, teon... aŭ mateon: infuzaĵo sorbata per speciala suĉilo metita en herboplena ujeto ĉiufoje plenigata per varmega akvo.

En Argentino vino estas la natura amiko de manĝoj. La seka kaj sunplena klimato de la andaj provincoj garantias ĝian kvaliton... Ĝi venas ankaŭ en kartonaj skatoloj, kiel lakto aŭ suko, tiel kutima ĝi estas!

## LANDO DE KVAR SEZONOJ

Argentino situas inter la tropiko de Kaprikorno norde kaj la Horna Kabo sude, kaj inter la Andoj okcidente kaj la Atlantiko oriente. Tio ebligas la plej grandan varion de pejzaĝoj kaj klimatoj eblaj, kun praktike ĉiaj faŭno kaj flaŭro. Argentino estas konata ankaŭ kiel "lando de la kvar sezonoj": dum en la nordorienta pluvarbaro fosforeskaj papilioj petolas inter orkideoj, la plej vastaj pingvenaroj de la mondo svarmas sur la patagoniaj strandoj kaj de tie vi povas ankaŭ admiri majestan balenon... Tie ĉi ĝi estas natura monumento tuŝebla nur karese, kio ja foje okazas dum boataj ekskursoj!

La oka plej vasta lando en la mondo havas multon por proponi. Plej vizitindas: la akvofaloj Igvazuo (Misiones); glaĉero Perito Moreno (Santa Cruz); grandbienoj (multaj kun turismaj itineroj); faŭnoriĉaj marĉoj el Iberá (Corrientes); Ushuaia (Fajrolando), la plej suda urbo el la mondo, de kie eliras plejparto el la ekspedicioj kaj ekskursoj (tiuj ĉi nur somere) al Antarktio; barokstila Salta, "la belulino", de kie eliras la fama Trajno de la Nuboj (434 km, 15 horojn tien-reen) tra trideko da pontoj kaj dudek tuneloj i.a. ĝis 4 220 m da alto; Córdoba-urbo kaj -provinco, kun Unesko-heredaĵoj arkitekturaj kaj Punilla-valo kun ĉarmaj feri-urboj; Mendoza, duondezerta provinco kun tri oazo-sistemoj, de kie vi povas preni busan ekskurson al Akonkagvo, la plej alta monto de la amerika kontinento... Sed ĉefe, atendas vin popolo amikema kaj gastama.

Vidu pli ĉe www.facebook.com/uk2014.





